ga E-Ligo kaj aliaj. Dum salutvortoj de la landaj reprezentantoj nialanda reprezentanto krom alia tralegis salutleteron al la Kongreso de la ĉefa direktoro de ĈSD ing. Ivo Malina, CSc. IFEF-prezidanto Joachim Giessner skizis en sia parolo la nunan staton de IFEF, sed ankaŭ atentigis pri danĝeraj kaj urĝe solvendaj mondaj problemoj kaj deklaris la 42an IFEF-kongreson malfermita.

Post fotografado kaj tagmango komencis antaŭ la kongresejo la sole-na marŝo tra parto de la urbo al la strato, kiu ricevis la nomon "Esperantogata". La imponan procesion antaŭiris la Fervojistaj Blovorkestro de Hamar, sekvata de diverslandaj uniformitaj fervojistoj. Por nialandaj partoprenantoj estis surpriza la enkonduka marŝo ludata - "Kolíne, Kolíne" de František Kmoch, kiun oni kantis en ĉeĥa lingvo.

Post la stratobapto ni ĉiuj veturis per autobuso al Jernbanemuseet (Fervojmuzeo), kie troviĝas rica kolekto de historia fervoja ekipaĵo, la plej granda en Skandinavio. Multaj gis la veturon per historia mallarg-spura trajno kun vapora lokomotivo tra areo de la Fervojmuzeo, acetis belajn bildkartojn, prospektojn kaj alian materialon pri la eksponatoj, ekz. pri malnovaj lokomotivoj, vagonoj kaj eĉ stacidomoj.

Nialandaj reprezentantoj aktive partoprenis ĉiujn kongresajn aranĝojn kaj kunsidojn, kolektante spertojn bezonatajn por arangi venontjare la 43an IFEF-kongreson en Brno.

La ĈEA-prezidanto Ing. Petr Chrdle, CSc. bone estris kunsidojn de la Fake Aplika Komisiono.

Dum publika plenkunsido en du partoj estis pritraktataj multaj gravaj punktoj. Ni menciis novelekton de prezidanto kaj kasisto - la nova prezidanto de IFEF anstataŭ la demisiinta s-ro Joachim Giessner estis unuanime elektita s-ro Per Engen el Norvegio, s-ro Henning Hauge estis reelektita kiel kasisto. S-ro Joachim Giessner estis elektita kiel honora prezidanto de IFEF. La venontjara 43a IFEF-kongreso okazos en Brno en tagoj 11.-17.5.1991.

La kotizo por IFEF, kiu estis nesangita dum plenaj 16 jaroj, estis altigita je 20 % - de 5 al 6 svisaj frankoj.

Estis akceptitaj aligpetoj de du fervojistaj sekcioj al IFEF - Fervojista Sekcio de Slovakio E-Asocio kaj tiu de Estonio.

Kiel kongresloko por la jaro 1992 estis aprobita urbo Münster en Germanio, la 44a IFEF-kongreso tie okazos 16.-22.5.1992.

S-ro Per Engen prezentis marde posttagmeze la ĉefprelegon sub la temo "La Centra Stacio de Oslo". Ĝi estis ilustrita per lumbildoj kaj en kajera formo kaj krome kiel resumo disdonata al la aŭskultantoj.

Dum programero "Fervojaj aktualaĵoj el la diversaj landoj" estis prezentataj ankaŭ du prelegetoj pri nialandaj temoj, en prezento de Magdalena Feifičová kaj Jindřich Tomášek.

La Terminara Komisiono kunsidis lunde. Kvankam ni nun havas nian Fervojan Terminaron, la TK staras antaŭ giganta laboro, t.e.:

- la Nacilingvaj Vortaroj
- la Difina Vortaro
- la Aktuala Fervoja Vortaro.

Konsiderante tiujn faktojn oni sugestas, ke ni tuj provu en ĉiuj landaj IFEF-sekcioj pligrandigi la nombron de kompetentaj TK-kunlaboran-

toj por kiel eble plej diversaj fakoj.

Se temas pri aliaj kulturaranĝoj de la Kongreso, ni devas menciigi la eksterordinaran koncert-travivaĵon en la katedralo de Hamar, kie vespere dum Pentekosta Lundo okazis neforgesebla koncerto kun orgeno kaj virĥoro en altkvalita, animskua prezentmaniero. La virĥoro Låiten Sangforening sub direktantino Inger Pernille Stamarud, kun katedrala organisto Ragnar Rågeberg kaj solkantistoj demonstris altan muzikkulturon de Norvegio kaj prezentis tipan norvegan kaj alilandan muzikon kaj kantojn.

Dum la ĵaŭda vespera Kultura programo en la Teatro ni denove kun ŝuo auskultis kantojn en prezento de la virĥoro Låiten Sangforening, programon de la Tirharmonika klubo de Elverum, spektis aron da dancoj, uzataj dum pasintaj jardekoj en la grandbienoj de la regiono Hedemarken en prezento de la Popoldanc-tacmento Sålja, kaj vidis specialan folkloran dancon "La Hellinga Salto" uzatan en la suda parto de Norvegio en prezento de juna paro.

Dum bankedo kaj kongresa balo en diversaj salonoj de la hotelo "Victoria" oni laŭdezire dancis kaj amuzis sin.

Dum programero "Prezentado de la 4ja IFEF-kongreso en Brno" niaj reprezentantoj vaste informis pri preparlaboroj de la venonta IFEF-kongreso en Brno kaj pri la postkongreso okazonta en Žilina, Slovakio.

Al la kongresa programo apartenas ankaŭ ekskursoj kun celo iomete ekkoni la gastigantan landon. La unua tuttaga ekskurso okazis la merkredon. Per aparta E-traĵno por ĉiuj kongresanoj (dankon al LKK!) kaj informataj per trajna laŭparolilo bone gvidata de s-ro Per Johan Krogstie ni veturis orienten ĝis Elverum kaj poste norden laŭlonge de la rivero Glåma, la plej longa en Norvegio, ĝis Røros, iama mineja urbo en la norvega altmontaro, nuntempe moderna industria centro kaj samtempe vivanta muzeo. Ne eblas priskribi ĉiujn vidindaĵojn, kiujn ni spektis. Ni menciigu almenaŭ du interesajn detalojn: Veturante en la vastaj arbaroj en Østerdalen ni eksciis, ke la vagadantaj tie aroj da alkoj estas vera problemo por la trafiko laŭlonge de sosojoj kaj fervojoj. Ofte okazas kolizioj inter bestoj kaj veturiloj. Tial oni en la lokomotivo havas pafilon por povi mortigi vunditajn bestojn. En Røros ni krom alia visitis la Luther-evangelianan preĝejon kun 1500 sidlokoj, aranĝitaj en etagoj kaj kun la pupitro super la altaro. Por nialandanoj estis surpriza, kiam la preĝeja organisto salutis nian multnacian kompanion per la vortoj "Dobry den", por poste koncerti iomete post enkondukaj vortoj sur bona orgeno, devenanta el Krnov.

Dum alia tuttaga ekskurso ni denove veturis per la "verda trajno" laŭlonge de longa lago Mjosa nordokcidenten ĝis Lillehammer, loko de la Olimpikaj Ludoj en 1994 kaj administra centro por la gubernio Oppland. Tie ni visitis grandan popolmuzeon Maihaugen sur areo 369.000 m², kie staras diversaj rekonstruitaj domoj de regiono Gudbrandsdalen. Post komuna, tipe norvega tagmango en loka restoracio, la kongreso oficiale finigis. La kongresa flago estis transdonita al Ing. Petr Chrdle, la prezidanto de LKK por la venontjara IFEF-kongreso en Brno.

Per Esperanto-traĵno ni komune veturis al Oslo, de kie ni post adiaŭo kun niaj norvegaj gastigantoj kaj aliaj geamikoj forveturis tra Sve-

dio kaj GDR hejmen. Domage, ke kaŭze de nekonvena konduto de la du nialandaj grupoj Danlando ne permesis veturon de nia vagono tra Kopenhavn al Hamburgo kaj Hannover en FRG, kiel estis planite. Tamen ni revenis kontentaj kaj kun animoj plenaj de belaj travivaĵoj kaj bonaj rememoroj.

Jindřich Tomášek



Parto de nialanda karavano en la strato ESPERANTOGATA en Hamar post la solena nomsanĝigo de tiu strato



Alia lokomotivo kun IFEF-emblemo, kiu veturigis E-trajnon dum alia tuttaga ekskurso al Lillehammer kaj poste al Oslo

INTERLINGVISTIKA

SEMINARIO

En la tagoj 29-a ĝis 31-a de marto 1990 okazis jam la dua interlingvistika seminario, kiun organizis Slovaka Esperanto-Asocio kunlabore kun la Lingvosciencia Instituto de Ľ. Štúr de la Slovaka Akademio de Sciencoj en ties sidejo en Bratislava.

La seminarion malfermis d-ro S. Košecký. En la nomo de la Lingvosciencia Instituto alparolis la ĉeestintojn prof. d-ro Ján Horecký, DrSc., kiu akcentis la signifon de interlingvistiko kaj esperantologio por la ĝenerala lingvoscienco kaj de komparado de la evoluo de la funkcianta planlingvo kun la evoluo de etnaj (precipe internaciaj, sed ne nur) lingvoj. Li atentigis pri la fakto, ke Esperanton oni devas esplori nur kiel plene funkciantan planlingvon, kiu ĝi sendube estas, por povi malkovri ĝiajn ecojn. Li bonvenigis ĉiujn sub la tegmento de la Lingvosciencia Instituto kaj same deziris al ili sukcesan traktadon.

Laŭ la programo prelegis entute 17 lingvistoj el entute 10 fakultatoj de universitatoj (ev. altlernejoj), krome lingvistoj el la Lingvosciencia Instituto. La partoprenintoj auskultis dum la seminario jenajn prelegojn (laŭvice):

- prof. Alexander D. Duličenko, DrSc. (Universitato Tartu): Lingva kreado kiel lingvistika kaj interlingvistika problemoj;
- prof. PhDr. Josef Skácel, DrSc.: Lingva diagnostiko de nuntempa socio kiel ero de lingvoplanado;
- PhDr. Slavo Ondraĵovič, CSc.: La rilato de konscia kaj spontana en la evoluo de naturaj lingvoj;
- doc. PhDr. Pavol Žigo, CSc.: La kategorio de tempo kiel konscia elemento en la lingvoevoluo;
- doc. PhDr. Marta Martonová, CSc.: La internaciigo en terminologio;
- PhDr. Milada Jankovičová/doc. Žigo: Al la demando de nacia kaj internacia en proverboj;
- PhDr. Sáva Heřman, CSc.: Lingva interkomunikado en nuntempa mondo;
- doc. PhDr. František Šimon, CSc.: La latina - la lingvo de scienco en pasinteco kaj hodiaŭ;
- PhDr. Oľga Škvareninová: La angla kaj interlingvistiko;
- Ing. Miroslav Hysko: Occidental-interlingue-teorio kaj historio de la projekto de internacia lingvo;
- PhDr. Věra Barandovská: La kontribuo de IALA al la problemoj de lingvoplanado;
- prof. PhDr. Ján Horecký, DrSc.: Geneza strukturo de vortprovizo en Esperanto;
- PhDr. Magda Šaturová: Ekvivalento en dulingva vortaro el la vidpunkto de la leksiko de Esperanto;
- PhDr. Erich Spitz, CSc.: Al la problemoj de lingvaj ebenaĵoj en la ĉeĥa, germana kaj Esperanto;
- PhDr. Stanislav Košecký, CSc.: Al kelkaj trajtoj de naturalismo en la aŭtonoma vortfarado de Esperanto;

- PhDr. Jozef Sipko: La rus-esperantaj lingvaj kontaktoj;
- Jana Matzová: Pri la ekonomieco de Esperanto kaj ĝia signifo por la lingvoinstruado.

La enhavon de unuopaj prelegoj montros la almanako, kiun oni planas eldoni. Ĝenerale estas konstateble, ke la seminario farigis bonega bazo por la pluevoluado de interlingvistika pensado en Ĉeĥoslovakio.

Gravan paŝon al ebla ŝanĝo de la sinteno al interlingvistiko en la direkto de ĝia "instituciigo" prezentas du rezolucioj akceptitaj kaj subskribitaj de ĉiuj partoprenintoj dum la dua labortago, en kiuj oni rekomendas fondi fakojn de interlingvistiko ĉe la fondota "Silezia universitato" en Moravio kaj same ĉe la Filozofia fakultato de Komenský-Universitato en Bratislava.

Al la seminario apartenis ankaŭ ekspoziciode interlingvistika, esperantologia literaturo + E-gazetaro, kiu vekis apartan intereson ĉe neesperantistaj lingvistoj. (Laŭ -stk- en Esperantisto Slovaka n-ro 3/90)

Ghislaine Tilleux - Bruno Disano: Zamenhof

En la ĉeĥan tradukis Miroslav Malovec, eldonis Klubo de esperantistoj en Brno en junio 1990. Formato A5, 36 pagoj.

Bildstria rakonto pri la vivo de Zamenhof kaj pri kreo de Esperanto. Utiĝas kaj konvinkiga legaĵo por infanoj, sed ne nur por ili. En la unua duono de la broŝuro la historio de la vivo de Zamenhof estas en la ĉeĥa lingvo, en la dua duono la samaj bildoj ripetigas kun la Esperanta teksto. Sekve oni povas kompari ambau duonojn kaj tiel lerni la lingvon. Interna dupaĝo enhavas poresperantajn argumentojn kaj koncizajn klarigojn pri la Esperanta gramatiko. Gratulinda sukceso de la Klubo de Brno. Bela donaceto por infanoj, vendata en la oficejo de ĈEA por 12 kronoj. Se la broŝuro estus kolora, ĝi povus vendigi ankaŭ en ĵurnal-kioskoj.

Slaný

16-paĝa A5-formata broŝuro pri urbo Slaný. Eldonis baza organizaĵo de ĈEA "Paco kaj amikeco" en Slaný, redaktis Jana Malínská, tradukis ing. Emil Kaiser, ilustris Josef Vaněček.

La broŝuro prezentas koncize, sed en leginda formo la historion de urbo Slaný. Ĝi estas simpla stencilaĵo, sed belaspekta, klare presita, kun multaj ilustraĵoj. Ĝi malkapas la spertajn eldonantojn de la Informilo de la sekcio de E-invalidoj.

5 jaroj da laboro, zorgoj, espero eĉ ĝojo

12-paĝa A5-formata broŝuro verkita de Jana Malínská kaj Josef Vaněček kaj eldonita de BO de ĈEA "Paco kaj amikeco" en Slaný, 1990

Detala raporto pri la historio kaj aktivecoj de la sekcio de E-invalidoj ĉe ĈEA. Fine estas aldonita konciza historio de la E-movado en nia respubliko.

Ŝ u i s t a r a k o n t o

Kiam mi estis malgranda knabino, mi tre ŝatis rigardi majstron ŝuiston ĉe lia laboro. Mi flaris odoron de ledoj kaj admiris liajn ŝper-tajn manojn.

Majstro ŝuisto havis sian laborejon en nia strato. Kaj kiam mi iris el lernejo, mi ofte vizitadis lin. Li estis maljuna kaj babilema kaj homoj rakontis, ke majstro ŝuisto, kiam li estis juna, ĉe studis en la ĉefurbo. Sed li sian studadon ne finis kaj pro tio li devis fari tiun metion.

Mia majstro ŝuisto tre multe legis kaj sciis rakonti nekutime belajn fabelojn kaj rakontojn. Kaj kiam mi ne sciis fari miajn hejmajn taskojn, mi iris al majstro ŝuisto kaj li ĉiam bone konsilis al mi.

Miaj gepatroj longe ne sciis pri nia amikeco. Kiam mi unufoje diris al ili pri tio, mia panjo tre severe malpermesis la mi vizitadi mian maljunan amikon. Laudire - kion parolus homoj?

Sed mi estis neobeema infano kaj vizitadis mian maljunan amikon sekrete. Tamen de tiu tempo mi sidis en lia laborejo malantaŭ malpura, dika kurteno. Kiam klientoj vizitis majstron ŝuiston, ili neniam vidis min. Mi estis kasita tre bone. Tra malpura kurteno mi aŭdis interparolojn de klientoj kaj mi senpacience deziris, ke ili rapide foriru, por ke majstro ŝuisto povu denove rakonti al mi. Mi havis en tiu tempo nur dek jarojn, sed majstro ŝuisto parolis kun mi, kiel kun matura knabino.

Foje mi sidis, kiel kutime, post malnova, malpura kurtego. Sed majstro ŝuisto ne havis kutiman bonhumoron. Li silentis kaj gemis.

"Sinjoro majstro, kial vi estas hodiaŭ tiel malĝoja?" mi demandis al li post longa silento.

"Ĉu malĝoja? Ne, mia malgranda submajstrineto. Mi nur pripensas pri io," li respondis al mi afable.

"Kaj ĉu vi ne povas diri al mi tion?"

"Tio ne estas por infanoj. Precipe ne por malgrandaj knabinoj."

"Sed mi estas preskaŭ plenaga! Post du jaroj mi havos dek du jarojn!"

"Do - bone. Kiel vi opinias!" Kaj mastro ŝuisto momenton pripensis.

"Jes," diris li fine, "hieraŭ mi legis en unu malnova ĵurnalo interesan rakonton. Kaj mi devas pensi pri tio ankoraŭ hodiaŭ. Iome nekredebla okazaĵo - - - Ĉu vi aŭskultas min, mia kara?"

"Jes, sinjoro majstro," mi ekgemis streĉoplena.

"Do - en iu urbo" - li komencis rakonti - "en iu urbo vivis unu homo. Li estis ankau ŝuisto. Lia laborejo estis malgranda kaj malpura,

kun na tro pura fenestreto, kiu montris nur peceton de trotuaro, ĉar la laborejeto estis en keletago. La majstro suisto estis jam maljuna kaj li vivis en sia laborejo tute unusola.

Kvindek jarojn tiu suisto rigardis tra la malalta fenestreto la trotuaron, sur kiu li vidis nur piedojn de preterpasantoj. Oni povas diri, ke li travivis preskaŭ tutan sian vivon nur inter suoj. Kiam li ĝuste suojn ne riparis kaj ripozis, li denove vidis tra la vitro de sia fenestreto nur piedojn kaj suojn de siaj homfratoj.

La suisto dum tiuj longaj jaroj ellernis koni homojn tre precize nur laŭ iliaj piedoj kaj suoj. Li jam ne devis vidi iliajn vizaĝojn: li sciis, ke rugaj suoj, kiuj preterpasis lian keletagan fenestreton, apartenas al fraulino, iranta rendezuon. Kaj grandaj, nemodernaj, malnovaj suoj apartenas certe al avineto, kiu iras aceti.

Sed nia majstro suisto sciis solvi ankaŭ specon de profesio kaj laŭ maniero de irado li ekkonis eĉ karakteron de homo.

La irmaniero, piedoj, suoj kun iliaj kalkanumoj kaj plandumoj - nur laŭ tio li konis homojn pli bone, ol jugisto de tiu urbo. Tiu lia peceto de trotuaro estis ege rica mondo, kiun konis nur li kaj kiu apartenas nur al li. -

Foje, en aŭtuno, la majstro suisto post laboro sidis en sia laborejeto kaj rigardis - kiel kutime - la preterirantajn piedojn kaj suojn. Malrapide krepuskigis. La majstro suisto jam volis lumigi sian lampon, kiam - -

Preter la fenestro iris piedoj. Ŝajnis esti ordinaraĵoj piedoj en ordinaraĵoj, nigraj suoj, kiuj apartenis al iu juna viro. Sed la suisto en tiu momento paligis. Li forgesis sian lampon kaj elkuris el sia laborejo. La piedoj, kiujn li ekvidis, rapidis al io nebona. Tion la majstro suisto ekkonis tute certe: tiu maniero de irado apartenas nur al homo, kiu iras fari ion malbonan...

La majstro suisto eĉ ne fermis la pordon de sia laborejo kaj kuris post la nekonata viro.

Sur la strato eklumis lanternoj.

La nekonata junulo rapide trairis lumplanan straton kaj eniris malhelan parkon. En la venonta momento silueto de la juna viro ekstaris ĉe malnova, malhela muro.

Kun batanta koro la majstro suisto alproksimigis sin al la juna viro kaj metis sian malmolan manon sur lian sultron.

La junulo skriis kaj rapide turnis sin.

"Ne faru tion, kion vi volas fari - - mi petas vin!" diris al li la majstro suisto mallaute.

"Kiu vi estas, sinjoro?" demandis la junulo rauke. "Kaj kiel vi povis scii, ke mi - -"

"Mi estas nur maljuna, laca homo. Kaj mi ekkonis ĉion nur laŭ viaj piedoj."

"Mi ne komprenas - - " ekflustris la virĝo. Kaj en la sekvanta sekundo li ekpalpis rapide sub sian mantelon. Ĉe en la mallumo ekbrilis klingo de trancilo.

"Prenu tion," diris la juna viro kaj aldonis rapide: " - - Ĝi estis ĉio por mi. Ĝis tiu momento, kiam alvenis li. Mia plej bona amiko. Kaj nun li ĉiutage tra ĉi tie iradas. Al si. Mi volis - - sed nun mi jam ne povas - - . Mi foriros el ĉi tiu urbo ankoraŭ hodiaŭ."

"Jes, sinjoro. Foriru el ĉi tiu urbo ankoraŭ hodiaŭ. Mi ankaŭ iam ĉi tiel foriris - - ."

Kaj post tio la juna viro malproksimigis jam senverte. Liaj piedoj iris peze kaj malrapide, kiel piedoj de tre maljuna homo...

Tion mi legis en tiu malnova ĵurnalo," diris la maljuna suisto kaj eksilentis.

Mi sidis sencepire kaj rigardis mian majstron ŝuiston. Nur malnova horlogo sur la muro rompita silenton en la laborejeto kun malalta fenestro, montranta nur peceton de polvoplena trotuaro.

Kaj antaŭ mi, sur la malgranda tableto inter malnovaj aĉaĵoj brilas nova, longa, tre akra trancilo.

Valorkurioza postmarko

Tiu ĉi evento efektive okazis al mi antaŭ kelkaj jaroj...

Foje mi kompletigis postmarkojn por sendi ilin al miaj fremdaj amikoj. Ĉe la tablo eksidis ankaŭ mia sesjara filino. Sur unu postmarko ŝi pentris bildeton - knabinan kapon. Sed mi tion ne vidis, ĉe mi ne sciis pri tio.

Preskaŭ post unu jaro mi ricevis leteron el Brazilo kun postmarkoj. Kaj mia filino ĉe vido de la postmarkoj tuj surprize ekkriis: "Jen la postmarko estas mia, vere, la bildeton sur la postmarko mi pentris mem," embarase ŝi aldonis kaj emfazis: "Jes, la postmarko estas efektive mia!"

Ŝi pravis, la postmarko estis cehoslovaka, kun alpentrita knabina vizaĝo. Mi tuj komencis sekvi la spurojn de la vojaĝo de nia postmarko.

Mia brazila amiko sciigis min, ke ĉi tiun postmarkon li ricevis certe el Kanariaj insuloj. Kaj poste li plu eksciis, ke lia kanaria amiko ricevis la postmarkon verŝajne el Svedujo. La nomo de la sveda sendinto estis al mi jam bone konata, ĉar ni kune korespondas jam longan tempon. Finfine, la afero estis jam tute klara.

La postmarko, kiu havas odoron de malproksimaj ekzotikaj landoj, estas por mi nun treege valora kuriozaĵo, dank' al Esperanto.

Jozef Ilečko, Bratislava

lingva angulo

Proceso

Ne pri la maljustaj verdiktoj en nia politika historio dum la regado de komunistoj ni deziras trakti, sed tute generale pri tio, kion PIV (1970) difinas jene: "Natura sinsekvo de fenomenoj, disvolviganta sen efiko de iu ekstera forto kaj rigardata en sia tuteco, imposticoma progresado kaj finaj rezultoj." Ĝi ne pri la difino mem mi volas cerbumi. Interesas min ĉi-konekse la sola vorto kaj ĝia stranga sorto en Esperanto.

La vorto proceso estas prenita el la latina substantivo processus, kiu kreigis el la supina formo de la verbo procedere = ekiri, iri antaŭen, plupasi, progresi k.s. La substantivo transiris en multajn lingvojn, el kiuj ni hazarde elektu dek: cs: proces. de: Prozess. en: process. es: proceso. fr: proces. processus. hr: proces. it: processo. po: proces. ru: process. sk: proces.

Ni konstatas, ke iuj lingvoj fidele konservas la originan SS kiel garantion de la gusta S-prononcado (kaj de la S̄-prononca ekvivalento angla). Aliaj lingvoj simpligis la originan ortografion al unusola S, por ke redonigu la prononco sama. En tiu ĉi kunteksto aperas nepre kurioza la formo lancita en PIV: "procezo". PIV registras ĝin apud proceso, al kiu oni klopodas atribui la signifon prefere jursciencan. La klopodanienel estas plene konsekvenca: "procezo" = proceso 2...

La vorto "procezo" estas malbonsanca, ĉar ĝi spitas kaj la skribmanieron, kaj la prononcmanon, ĉu de la fontolingvo, ĉu de multaj lingvoj modernaj. Por pruvi la ĵusan tezon precipe el la vidpunkto esperantlingva, ni referencu al la tre utila vortaro IVE (1989). Ĝia inversa listigo donas eblecon sinoptike demonstri, ke 93 radikoj prenitaĵ el PIV, PIVS (1987) kaj EB (1988) finigas je -ez:

1 Zamez, 2 obez, 3 diocez, 4 procez, 5 diapadez, 6 ardez, 7 fez, 8 Efez, 9 ekzegez, 10 VogeZ, 11 piez, 12 lapiez, 13 Jez, 14 Marseljez, 15 Irokez, 16 markez, 17 alez, 18 Kalez, 19 Valez, 20 blez, 21 Blez, 22 Habelez, 23 anlez, 24 komplez, 25 Arlez, 26 meZ, 27 NemeZ, 28 hematemeZ, 29 intermez, 30 tmez, 31 genez, 32 Genez, 33 morfogeneZ, 34 abiogeneZ, 35 biogeneZ, 36 embriogeneZ, 37 filogeneZ, 38 partenogeneZ, 39 ontogeneZ, 40 frenez, 41 magnez, 42 kinez, 43 telekinez, 44 kariokinez, 45 majoneZ, 46 poloneZ, 47 PeloponeZ, 48 VeroneZ, 49 poez, 50 limfopoeZ, 51 leukopoeZ, 53 trapez, 54 aposiopez, 55 speZ, 56 pareZ, 57 brez, 58 hereZ, 59 dierez, 60 sinerez, 61 Terez, 62 interez, 63 histerez, 64 freZ, 65 krez, 66 katakreZ, 67 kataforeZ, 68 preZ, 69 apreZ, 70 diureZ, 71 enureZ, 72 teZ, 73 diateZ, 74 metateZ, 75 antitez, 76 paracenteZ, 77 epenteZ, 78 parentez, 79 fotosinteZ, 80 sintez, 81 hipoteZ, 82 proteZ, 83 ArteZ, 84 kortez, 85 mortez, 86 esteZ, 87 radiesteZ, 88 anesteZ, 89 kinesteZ, 90 prosteZ, 91 Suez, 92 vez, 93 paveZ.

El ili solaj dek (nome 6, 24, 26, 40, 52, 55, 58, 68, 72, 78) estas fundamentaj. Sur ili estu al ni permesate tiel dire "kontroli" fonetikan

senton de nia Majstro:

6 ardezo, fr: ardoise, it: ardesia

24 komplezo, fr: complaisance

26 meza, gr: mezon = komparativo de megas, do io inter "granda" kaj "plej granda"

40 freneza, it: frenesia

52 pezi, fr: peser, it: pésare

55 spezo, it: spésa

58 herezo, fr: hérésie

68 prezo, it: prezzo

72 tezo, gr: tesis, la: thesis, fr: these

78 parentezo, v. 72.

Jen do: Esperanto prave kopias la Z-prononcon de la intervokala S; escepton faras 55 kaj 68, kiujn la italoj prononcas S kaj C respektive: notindas, ke - konsekvence - en la vorto spezo, tiu Z ne venas el fontolingva SS, en la vorto prezo (latine pretium, kun la C-prononco identa kun la itala) same ne. Male, la fundamenta vorto prezo logike venis el la latina: pressum. Ankaŭ okaze de 26 ne temas pri intervokala S, sed pri la greka Z (dzeta).

Konkludo: Zamenhof neniam transformis SS de fontolingva al Z de Esperanto!

Duapase, ni esploru, kiel procedis liaj posteuloj, ricigante la vorttrezoron de Internacia Lingvo:

1. La Z-prononco de Esperanto identigas kun la fontolingva, se rolis tie la intervokala S, en jenaj okazoj: 1-3, 5, 7-10, 12-25, 27-28, 30-39, 41-51, 54, 56-61, 63-67, 70-93.

2. La Z-prononco de Esperanto identigas kun la greka Z en jenaj okazoj: 11, 29, 53.

3. La Z-prononco de Esperanto divergas de la fontolingvaj (latina, itala) C en 62 kaj 69. Okaze de 62 eblas diskuti la etimologion. Ne sciante, kiu lanĉis la vorton interezo, mi povas nur konjekti, ke ĝi estas prenitata el it: interézza. Okaze de 69, notinda, sed por ni ne relevanta, estas la fakto, ke la verbo aprezi havas sian konkurencon apreci.

Restas do la unusola okazo n-ro 4, nome la fatala barbohava angeliĝo "procezo". Kia bonŝanco, ke neniu imitis ĉi tiun fonetikan monstron! Ne kreigis ekz. "kongreso" por ĉiuspecaj kongresoj, dum "kongreso" estus rezervata sole por Universalaĵ Kongresoj! Ĉu mi timas mencii pluajn absurdulojn, por ke ili hazarde ne kontrabandigu en iun vortaron. Ja el PIV, la "procezo" disvastigis en ĉiujn eblajn vortarojn, ĉar la esperantistoj kutime konsideras la sendube valoran verkegon kiel netusenadan kaj netuŝeblan...

Kion do rekomendas mi? Vaste apliki la vorton procesado ankaŭ en la PIV-a signifo 2 kaj laeble eviti la fonetike kriplan formon "procezo", per kiu incitigas oreloj.

Referencoj:

Josef Kavka

KB = Rüdiger Eichholz (1988): Esperanta Bildvortaro. 880 p. - Esperanto-Press, Bailieboro.

Paderborno.

IVB = Bernherd Pabst (1989): Inversa Vortaro de Esperanto. 91 p. - Esperanto-Centro

PIV = Gaston Waringhien k.a. (1970): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. 1300 p.

- Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

PIVS = R. Levraud; G. Waringhien k.a. (1987): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento. 95 p. - Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

Renkontigo B-B-B "90"

La unuan semajfinon de junio (1.-3.6.1990) kunveturis 69 partoprenantoj de la tradicia renkontigo B-B-B, ne nur el Brno, Bratislavo kaj Budapeŝto, sed ankaŭ el aliaj urboj de Ĉeĥoslovakio, en la junularan hotelon Družba ĉe valbaraĵa lago ĉe Brno. Programo de la renkontigo komenciĝis vendrede post vespermango per sipa ekskurso sur la valbaraĵa lago. Sabate okazis tuttaga perbusa ekskurso "Kie batalis Napoleono", dum kiu la partoprenintoj vizitis kastelon kaj ekspozicion en urbo Slavkov, plus Monumenton de Paco sur la monteto ĉe vilago Prace kaj batalestrejon de Napoleono (monteton Žurán), antaŭvespere poste pupteatran esperantlingvan prezentadon "Ludo pri Dorota" en teatro Radost en Brno. Post reveno al hotelo kaj vespermango okazis societa ĝmusa vespero dum kiu prezentis sin ankaŭ iluziisto s-ano Rýznar el Pardubice. Dimanche antaŭtagmeze okazis projekciado de diapozitivoj pri Brno kaj aliaj moraviaj urboj. Ĉar la vetero estis favora kaj dum la tuta renkontigo regis vera samideana etoso, do ĉiuj partoprenintoj disiris hejmen tre kontentaj kun saluto: "Ĝis revido venontjare en Bratislavo!"

Jiří Procházka

Havířov

La 24-an de majo 1990 projekciis nia prezidanto Zdeněk Heiser diapozitivojn pri malnovaj ĉeĥaj pentristoj kaj skulptistoj, bildojn de mondkonataj pentristoj el aliaj landoj kaj epokoj (ankaŭ de Picasso kaj Dalí) kaj fine siajn plurajn moderne konceptitajn bildojn (li estas instruisto de pikturo). Ĉion li komentariis tre konvene. S-ano Miloslav Pastrnák informis pri enhavo de la ĈEA-bulteno. - La 21-an de junio rakontis s-ro S. Chmiel pri sia libertempo en Turkio kaj la 28-an de junio, okaze de fino de la laborsezono 1989/90, okazis la tradicia pikniko, por kiu oni sukcesis trovi novan lokon en Havířov-Šumbarok.

Ast.

ITREE 90

Ĉi-jare okazis jam la XIII-a ITREE-renkontigo (7.-11.V.) en Eromontara urbeto Antonsöhle. Partoprenis ĝin 41 ceestantoj, krom germanoj kaj ĉeĥoj ankaŭ 1 litovo, 1 s-ino el Leningrado kaj 2 hungaraj geedzoj. Ĉio estis perfekte aranĝita - logado, manĝado, piedaj kaj busaj ekskursoj. Ni vizitis kelkajn tre interesajn muzeojn, preĝejojn ktp. Nur unu afero estis por ni ĉeĥoj malbonŝanca: la aliigita monkurso estis tre malfavora por ni. Multaj aliĝintaj ges-anoj pro ĉio ne alveturis. Ni esperu, ke post 2 jaroj (venontjare - 1991 - ITREE okazos en ĉeĥa flanko de Eromontaro) ĉi tiuj mon-aferoj iel solvigos! Mi volus danki al s-ro Eichler kaj al liaj klubaj helpantoj, ke ni povis travivi kelkajn belajn tagojn en amika sincera medio dank' al ilia ofe-remaj laboro.

Zý - Plzen

Kašperské Hory

Nia pilzerna klubo aranĝis jam la duan renkontigon en ŝumava urbeto Kašperské Hory - de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo. Denove la renkontigo estis tre sukcesa. Bele ekipita uzina kabano, kie ni komforte loĝis, mangis, vespere amuziĝis, estis plenplena. Alveturis grandnombre niaj karaĵaj ĝeamikoj el Strakonice, el Praha kaj Mělník. La vetero favoris nin, promeneante ni ĝuis belegan panoramon de Ŝumava-montaro, la ŝumon, amikau etoson kaj ankaŭ bonan Esperanton! Dank' al s-ro Klíma, Vomečka kaj Pech ni ĉiuj travivis du belajn tagojn.

Kun granda funebro ni eksciis pri forpaso de s-ro Jaromír M e l i c h a r , laboranto en la ĈEA-oficejo. Li mortis post mallonga malsano la 23-an de junio 1990 en ago de 75 jaroj. Honoron al lia memoro!

Influo de patogenaj zonoj al nia sano

La prevento, unua helpo ĉe malsano, kondiĉoj necesaj por sukcesa kuracado de homo, strebado kontraŭ tumormalsaniĝoj...

Lastatempe en nia lando oni diskutas pri tio, kio estas la patogenaj zonoj kaj kiajn malfacilaĵojn ili povas kaŭzi.

Ni difinas la patogenajn zonojn kiel neregulajn partojn de spaco malutilajn por la homa organismo, sargitajn de konataj kaj ankau ĝis nun nekonataj specoj de radiado aŭ miksaĵoj de tiuj ĉi radiadoj, eventuale de altigita koncentriĝo de iuj kemiaj substancoj, trovigantaj sur aŭ ĉe sub la limo mezurebla per ordinare alireblaj aparatoj.

Parto de tiuj ĉi samnecaj zonoj estas konata sub la nomo geopatogenaj aŭ geonomalaj zonoj (en Ĉinio nomataj "drakvejnjoj"). Ilia efiko plifortigas inter la noktomozo kaj kvara horo matene kaj en la periodo de plenluno. En tiu tempo ili povas kaŭzi rimarkindajn psikajn kaj fizikajn malfacilaĵojn. La estiĝo de incitazono dependas de la strukturo kaj kvalito de geologiaj tavoloj, de la fontoj de subtera akvo kaj de pluaĵ, ĝis nun nekonataj faktoroj. Oni parolas pri sangoj en la elektra kaj magneta kampoj de la tero, eventuale pri perturboj en la gravita kampo, iam pri "tera radiado". La intensecon de tiu ĉi radiado determinas jam de praaj tempoj vergetuloj. Dum ne ekzistas universala mezuraparato, kiu kapablu anstataŭi la subjektivan indikon de vergetulo. Dum konstruado de novaj domoj estas necese atenti pri tio, ke tra la logataj cambroj de la konstruaĵo trairu kiel eble plej malmulte da incitazonoj. En la mondo per solvado de konstruprojektoj konsidere al la rezultoj de geobiologia esploro okupiĝas multaj firmaoj. La ĝusta lokigo kaj interna solvo de konstruaĵoj havas ja eksterordinaran signifon por laborkapablo, psika

trankvilo kaj sanstato de homoj, kiuj en ili longtempe restadas. Estas interese, ke kun la kreskanta distanco disde la tero la intenseco de la zonoj ne malaltigas, sed iam plialtigas kaj iliaj strioj larĝigas. En montaroj la geonomalaj perturboj estas malmultaj, tial tie ankau ofte plibonigas nia sanstato, tial ni trovas en montaroj plej multe da longegaj homoj. Kompreneble temas pri simpligita unuflanka pritakso, la aferon koncernas ankau multaj pluaĵ faktoroj kiel la kvalito de atmosfero, nombro de stresoj kaj simile.

La geonomalaj zonoj estas ofte kompletigataj de civilizaciaj influoj, kiujn ne eblas preterlasi ĉe konstataĵo de patogenaj zonoj.

Ni flankenlasu la demandon de origino de patogenaj zonoj kaj ni direktu nian atenton al la praktika eksplikoj pri tio, kiajn malfacilaĵojn ili kaŭzas.

La patogenaj zonoj helpas al estiĝo de vasta skalo de diverse gravaj sangenaĵoj. La grado de sanperturbigo dependas de la suma restadtempo en la zonoj, de ilia intenseco, sed ankau de la defendokapablo de organismo de la trafita homo. La kompleta rezistkapablo kompreneble dependas de la tipo de homo, de lia korpostato kaj de tuta lia vivoestilo. Ĉe bona denaska sanstato kaj laueble sana vivmaniero (adekvata moviĝo, nutraĵo, interesoj kaj interhomaj rilatoj) eblas rezisti al la patogenaj zonoj relative longe.

La plej danĝeraj estas la zonkruĉoj. En tiuj ĉi lokoj la intenseco de zoninfluo kutime mortige fortigas kaj ĉe tute sanaj individuoj kapablas rezisti ilian influon nur dum limigita tempo. Nur en tute esceptaj kazoj la zonoj kru-

cigante sin reciproke malfortigas aŭ nuligas.

El vidpunkto de patogenaj zonoj estas por la homa sano decidaj la lokoj de longdaŭra restado. Tio signifas la laborlokon (se la homo dum laboro daŭre sidas aŭ staras) kaj plue la lokon de ripozo. Sed la plej grava estas la lokigo de lito. Nokte la homo devus ripozi, regeneri la fortojn, la organismo havas tempon por ripari etajn aŭ pli grandajn difektojn estigintajn dum la tago. Se ni dormas sur nekongvena loko, la organismo anstataŭ ripozi devas mobilizi rezervajn fortojn por defendi sin kontraŭ influo de la zonoj. Dum ĉerta tempo tiu eblas, sed la rezervoj ĉiam malgrandigas. Venas tempo, kiam la organismo ne havas sufiĉon da energio por riparo de la plej banalaj perturboj. Laŭvice plimultigas pluaj kaj pluaj perturboj kaj ni trovigas en la sorca cirklo de malsanoj, kiuj dum la tempodaŭro fariĝas kronikaj. Se ni longdaŭre kuzas en la zono, kies intenseco respondas al tri-kaj pli-oblaj krucigo de plej ordinare trovigantaj zonoj, krite kreskas la probableco de apero de tumeraj malsanigoj.

La lokigo de zonoj plej ofte detrimas, kiuj organoj estos dum jaroj difektitaj.

La krucigo de zonoj en loko de la torako plej ofte kazuas malsanigon de la bronkoj, pulmo, koro, dolorojn de la toraka vertebraro.

La krucigo en loko de la ventro antaŭdeterminas inflamojn de la galveziko, digestadmalfacilaĵojn, malsanigon de la pankreaso (iam diabeto), la kistojn, dolorojn en la lumba parto de la spino.

La krucigo en loko de la palvo helpas al ekmalsanigo de la renoj, virinaj organoj (ginekologiaj inflamoj, kistoj, iam eĉ sterileco). Ofte aperas doloroj en la sakro, doloroj de la koksoj, iskiatiko.


La krucigo trans la gamboj subtenas ekston de varikoj, lacigo kaj krurdoloroj, iam ekston de svalaĵoj aŭ inflamprocezoj.

En kazo de zonoj trairantaj la lokon de la kapo kaj kolo povas estiĝi esence kiaj ajn san- aŭ psikaj malfacilaĵoj, ĉar estas trafita nia "direktadcentro". La skalo de perturboj estas la plej vasta: lacigo, deprimigo, inci-

tigo, agresemo, memordifektiĝoj, iam maldormemo, inflamoj de kavaĵoj, koldoloroj, doloroj de kolospino, kapdoloroj, vertigoj. Povas aperi malsanigoj de hipofizo, tiroideo, kompleksaj perturboj de metabolismo, diabeto, inflamprocezoj en la korpo, spiritperturboj, senmaj difektoj kaj pluaĵ.

La homa organismo estas senmezure komplika sistemo kun sprite interligitaj ĉiuj ĝiaj partoj. Ĉe longtempa trafiteco de kiu ajn korpoparto pere de patogenaj zonoj (temas antaŭ ĉio pri krucigoj) povas ankaŭ esti trafitaĵo hepato kaj renoj, kiuj estas supersargataj de malnormale granda kvanto de metaboliaj produktaĵoj. Kun neperfekta eligado de forfalaĵoj el la korpo kutime estas ligita artrozo, artikdoloroj. La malakcelita metabolismo kontribuas al estigo de perturboj en la mastrumado per nutraĵoj kaj rezervaj materialoj, tial ofte aperas maldikeco aŭ male dikeco.

Konklude estas necese atentigi pri kelkaj aferoj: planon de via loĝejo farigu nur de homoj, ĉe kiuj estas bona garantio de fidiindeco (dokumentoj pri rajtigo al tiu ĉi agado, konfirmataj per ekzamenoj). Se ĉe iu homo la vergeto "iel" reagas, tio ankoraŭ ne signifas, ke li estas bona vergetulo. Dum mia praktiko mi renkontigis eĉ kun mala reagado de vergetulo. Konsekvence postulu dokumentojn kaj postulu desegnon de detala plano de la zonoj. La telestesia konstato sen plano estas ofte senvalora. Preciza plano ebligas al vi trovi la optimuman lokon por lito (la kapon sur "puran" lokon, la korpon almenaŭ ekster la krucigon. Se ne eblas eviti la krucigon, do situigu ĝin en la piedojn de lito.) kaj por labortabla kaj ripozloko. Bona kontrolo ofte estas infanoj. Se ili havas spacon, ili subkonscie sovigas flanken antaŭ la zonoj. Ni trovas ilin ofte en plej strangaj pozicioj, tordigintajn en buleton, transverse de la lito, iam eĉ per la korpo parte ekster la lito. Ofta falado de sur la lito devas vekti suspekton, ke estas trafita granda parto de la lito. Se infanoj havas la zonojn en loko de la kapo, ili turnigas per persista reguleco dum la nokto je 180 gradoj. Se ni ne estas instruitaj kaj devigas ilin longtempe dormi en la



En tiu ĉi dormocambro okazas triobla krucigado de tri strioj de patogenaj zonoj en la kaploko de kusanta homo kaj simpla krucigo de zonoj en la loko de ventro de lia partnero. Krom tio la cambra trafas per gena efiko fonto de subtera akvo.

zonoj ("ne malobeu, kusigu bele sur la kapkuseneton..."), tiam tiun ĉi bonegan kapablon dum la paso de tempo ili povas perdi.

Enplanigado de patogenaj zonoj povas ludi rimarkindan rolon en la batalo por la gano kaj feliĉo de homoj. Restaĉdo kaj cefe dormado ekster la dangaeraj zonoj rezultas ofte en neatendita plikvalitigo de la vivo. Poioime komencas plibonigi la komplete sanstato, komencas domini la pli optimisma opinio pri la mondo, pligrandigas energio. Oni farigas pli rezistema, pli grandanima, pli facile superas vivobstaklojn, plibonigas oniaj interhomaj rilatoj.

Ĉu vi malbone dormas, estas lacaj, malsanaj? Ĉu vi havas nekvietajn infanojn, kiuj ofte malsanetas? Kvalitan enplanigon de patogenaj zonoj kun konstato de ilia intenseco en logataj ejoj kaj laborlokoj kaj elserĉon de akvofontoj al vi certigos
ZONETA, Mánesova 44, Praha 2, tel.207133

LA KRISTNASKA VESPERO EN PRAGO

La pasintjara Kristnaska vespero en la Praga Klubo estis tre sukcesa. La kristnaska arĉbeto estis bele ornamita, la tabloj estis plenaj de donacoj kaj bongustaĵoj. Ges-anoj Kubová, Kyněl, Šperling kaj aliaj tre bone amuzigis. Ing. Pečený kontribuis al programo ne nur per kristnaskaj kantoj, sed ankaŭ per konataj Esperantaj poemoj, al kiuj li komponis plaĉajn melodiojn.
(Fotoj Šperling)





STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika aranĝo), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro), Ing. Zdeněk Pluhař kaj Helena Štruncová. Prezas Entrepreno de servoj de urbo Liberec. Transdonita al presejo 1990-09-15. Jarabono 36 ĈSK, por eksterlando 48 ĈSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoĵ. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelny vĕstník Ĉeského esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor), Ing. Zdeněk Pluhař a Helena Štruncová. Povolen o odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 15. 9. 1990. Dohlédací pošta Praha 07. Sniženy poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošť Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

			1	
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31
4	11	18	25	
5	12	19	26	
6	13	20	27	

			2	
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	
2	9	16	23	
3	10	17	24	31

			3	
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31

			4	
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	
4	11	18	25	
5	12	19	26	
6	13	20	27	
7	14	21	28	

			5	
	6	13	20	27
	7	14	21	28
	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31
4	11	18	25	
5	12	19	26	

Bela jaro

			6	
	3	10	17	24
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30

			7	
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31
4	11	18	25	
5	12	19	26	
6	13	20	27	
7	14	21	28	

1991

1kun

			8	
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31
4	11	18	25	

ESPERANTO

			9	
30	2	9	16	23
	3	10	17	24
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29

			10	
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31
4	11	18	25	
5	12	19	26	
6	13	20	27	

			11	
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29
2	9	16	23	30
3	10	17	24	31

			12	
30	2	9	16	23
	3	10	17	24
	4	11	18	25
	5	12	19	26
	6	13	20	27
	7	14	21	28
1	8	15	22	29

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979